## 2017-04-30 EURATOM – atomenergi/milita-dinosauro de Europ-Unio

Hans-Josef Fell prelegis en Freiburg/Breisgau pri la propagando favore al atomenergio, kiu delonge uzas falsigitajn informojn (en: Fake News); kashinte la riskojn, kaj kashinte, ke post la slogano „Atomoj por Paco“ staras la intereso produkti materialon por atombomboj.
Oni scias ke EURATOM apartenas al la kontraktoj de Romo el la jaro 1957, kaj estas unu el la bazaj partoj de la kontrakto de Lissabon, la kvazaua konstitucio de Europa Unio. Sekve de tio oni diras, ke neniu membroshtato de EU povas eliri el tiu kontrakto, ech se la lando ne subskribis al EURATOM, kaj nek volas uzi atomenergion, nek volas uzi atombombon, ekz-e kiel Austrio.
Tiu kontrakto postulas ke la membroshtatoj subtenu la esploron favore al atomenergio, kaj subtenu produkti la bezonatan materialon, konstrui atomreaktorojn; la esploro pri la temo medicino kaj sekureco (interna kaj eksterna). Chi-rilate temas ankau pri materialo por atombomboj, ech se tio ne estas temo; la Anekso II de EURATOM (ene de la EU-konstitucio) entenas „Nukleaj reaktoroj de chiaj tipoj kaj por chia apliko“ - tio signifas, ke ankau la „bredado“ da materialo por atombomboj estas entenata.
Tiu kontrakto neglektas alternativajn energiojn (akvo- kaj vento-energio dum 1952 jam ekzistis), sekve de tio multaj miljardoj fluadas en la atomenergion, sed nur kelkaj milionoj por evolui la alternativojn.
En 2007-02-28 la germana Verda Partio (Bündnis 90 / Die Grünen) publikigis rezulton de mendita esploro: chu EU-membroshtato rajtas malalighi (forlasi) la EURATOM kontrakton, kaj tamen resti membro de EU.
Fonto-indiko:
https://www.hans-josef-fell.de/content/index.php/dokumente/studien-und-analysen/915-euratom-gutachten-im-auftrag-buendnis-90-die-gruenen-bundestagsfraktion-2007/file
Komento AVE/mw: alternative oni povus shanghi la kontrakton kaj koncentri nur al sekurecaj kaj medicinaj temoj, kaj elmeti la subtenon por atomenergio - vidu la Rezolucion de Linz